RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
16/11/2016 18:55:19

Raúl Castro ĉeestis la prelegon de la kanada ĉefministro.

Havano, 16 nov (RHK) La kuba prezidento Raúl Castro, ĉeestis la magistran prelegon de la ĉefministro de Kanado, Justin Trudeau, en la Aulo de la Havana Universitato.

Ankaŭ ĉeestis la unua vicprezidento Miguel Díaz-Canel, la ministro pri eksteraj rilato, Bruno Rodríguez kaj Gustavo Robreiro, rektoro de la havana universitato.

La ĉefministro kanada respondis demandojn de la kubaj gestudentoj pri temoj kiel la negoc-rilatoj inter ambaŭ lando fronte al la limigoj starigataj de la usona sieĝo, la klimata ŝanĝo kaj la batalo kontraŭ la malriĉeco.

La preleganto elstarigis ke tiu nordamerika lando klopodas, per diversaj alternativoj, elradikigi la malriĉecon kaj pledas por la paco kaj la rajtoj de ĉiuj landoj.

Ekde sia enposteniĝo kiel ĉefministro de Kanado, en novembro de 2015, Trudeau oficiale vizitas Kubon por la unua fojo.